

# Esperanto por UN

## Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 61, novembro-decembro 2022



Universala Esperanto-Asocio

## Universala Esperanto-Asocio kunvokos virtualan kongreson kaj emfazos indiĝenajn lingvojn

Jam de la jaro 1905, la parolantoj de Esperanto kutimas kunveni ĉiujare en internacia kongreso. Kutime tiuj kongresoj arigas inter 1000 kaj 2000 homoj el kvindeko da landoj. La planata kongreso de 1914 (en Parizo) ne okazis pro la Unua Mondmilito, kaj la sinsekvo de kongresoj estis interrompita de la Dua Mondmilito – kaj de la lastatempa pandemio. Dum la pandemio, UEA kunvokis tre sukcesajn virtualajn kongresojn. Post du jaroj sen ĉeestaj kongresoj, la esperantistoj denove kunvenis por kongresi en 2022, en Montrealo.

Sed UEA decidis tamen daŭrigi la virtualajn kongresojn por tiuj kiuj ne povas vojaĝi al la “normalaj” kongresoj: la venonta okazos ĉi-jare de la 24-a ĝis la 27-a de novembro: <https://vk.esperanto.net>. La ĉefa temo estos sama kiel en Montrealo: la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. La Asocio aparte aprezas tiun programon de Unesko, kiu dediĉas atenton al lingva diverseco kaj la neceso inkluzivi en la mondan decidoprocezon ankaŭ la indiĝenajn popolojn de la mondo.

Se tiu ĉi modelo sukcesos, ĝi eventuale fariĝos konstanta aranĝo, suplemente al la kutima ĉeesta kongreso. La venonta ĉeesta kongreso okazos en aŭgusto 2023 en Torino, Italio.

## UEA alvokas al “paco, justeco kaj socia progreso” – kaj lingva egaleco, okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj

“Antaŭ 77 jaroj, post la teruraĵoj de la Dua Mondmilito, 51 nacioj ratifis la Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj. Tiel kreiĝis la plej granda kaj vere tutmonda organizo, la plej ambicia diplomatia klopodo por internacia paco. UN, nuntempe konsistanta el 193 membraj ŝtatoj, fariĝis la plej grava forumo por trakti tutmondajn aferojn.”

Per tiuj vortoj komenciĝas la ĉi-jara mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj (24 oktobro) – mesaĝo disvastigita tra la tuta mondo per la komunika reto de la Asocio. Atentigante pri la nuna monda situacio, la mesaĝo deklaris: “Kiel diris la Prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN Csaba Kőrösi, oni bezonas solvojn pere de solidareco, daŭripoveco kaj scienco. Ni bezonas konstrui surbaze de tio kio unuigas nin, kaj konstrui konfidon.”

“UN ne regas, sed kunvenigas,” la mesaĝo deklaras. Ĝi alvokas al la valoroj de la Ĉarto de UN: “paco, justeco kaj socia progreso” kaj asertas, ke “la mondo (tio estas ni ĉiuj kaj la naturo kie ni vivas) bezonas renovigitan decidon de la registaroj realigi tiujn celojn.” Ĝi atentigas, ke “Universala Esperanto-Asocio, ekde sia fondiĝo en 1908, laboras por montri la gravecon de la lingva flanko en la klopodoj por internacia kompreniĝo... Ni subtenas lingvan justecon, por ke ĉiuj estu aŭskultataj en decidoj por la estonteco de la homaro.”

La diversaj landaj Esperanto-asocioj, lokaj grupoj kaj specialigitaj asocioj aparte atentis UN-Tagon per specialaj agadoj kaj informaj kampanjoj.

## **La Asocio dediĉas apartan atenton al lingvaj laborantoj**

Okaze de Internacia Tradukada Tago (30 septembro), UEA aparte salutis “ĉiujn lingvajn profesiulojn kaj ĉiujn kiuj klopodas faciligi lingvan interkompreniĝon kaj interhoman komunikadon. Tradukado helpas alproksimigi la homojn kaj ebligas la interŝanĝon de humanaj kaj kulturaj valoroj inter lingvoj kaj kulturoj tra la tuta mondo.”

UEA estas konata kiel kunveniganto de parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto tra la mondo, sed malpli konata kiel aktivulo en la pli vasta kampanjo por faciligi internacian lingvan komunikadon per ĉiuj eblaj rimedoj. “Per tradukado ni povas antaŭenigi malfermitecon por paco kaj konfido, kontraŭ maljusteco, maltoleremo kaj cenzuro. Per tradukado ni kreas la rimedojn por tutmonda dialogo.” Tiel tekstis ĝia mesaĝo okaze de Tradukada Tago.

“Same,” daŭrigis la mesaĝo, “ni devas labori por la egaleca pritrakto de ĉiuj lingvoj, eĉ la plej malgrandaj – ĉar ĉiu homo rajtas al egala pritrakto, rajtas libere esprimi sin, kaj rajtas esti aŭdata. Plena kaj inkluziva tutmonda kunlaborado necesas, por konstrui mondon de plenaj homaj rajtoj, paco kaj evoluigo por ĉiuj. Dialogo surbaze de justeco kaj egaleco estas la vojo. Tio inkluzivu lingvan egalecon.”

## **La Premio Deguchi 2022 honoris fervoran laboranton por paco kaj kontraŭ nukleaj armiloj**

UEA starigis la [Premion](#) Onisaburo Deguchi en la Jubilea Jaro 1987. Ĝi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la ideo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de religia gvidanto de Japanio, Onisaburo Deguchi (Deguĉi). Spegule al la ideoj de Zamenhof kaj Deguĉi, la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. Ĝis nun 28 individuoj kaj 7 grupoj estas premiitaj, kaj nun estas anoncata la 29-a persono.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguchi de la jaro 2022 estas aljuĝita al Osioka Taeko. Osioka Taeko naskiĝis la 21-an de novembro 1948 en Hiroŝimo en Japanio kaj aktivis en sama urbo. Ŝi estas esperantistino kaj aktivulino por paco, virinoj, homaj rajtoj kaj kontraŭ nukleaj armiloj.

De jardekoj ŝi aktivis por Esperanto kaj paco. Ŝi subtenas la agadon de Japana Esperanto-Instituto (JEI) kaj plurfoje vojaĝis tra la mondo kiel parto de japana pacdelegitaro por ekspozicii pri Hiroŝimo kun la celo ne forgesigi la atombombadon kaj pledi por malarmo de atombomboj. Kun sia edzo (Osioka Moritaka, ankaŭ aktivulo de JEI) ŝi kreis la Hiroŝiman Esperanto-Centron.

Fakulo pri la atombombado, en 2018 ŝi lanĉis [libron](https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=78) ([katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=78](https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=78)) pri la temo. En 2020 ŝi speciale prelegis kadre de la Monda Festivalo de Esperanto, okaze de la virtuala [Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco](#), kiu markis la 75-jariĝon de la atombombado en Hiroŝimo kaj Nagasako. La [prelego](#) temis pri ŝia esplorado pri atesto de koredevena postvivinto de la atombombado. En 2021 ŝi estis la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 108-a Japana Kongreso en Hiroŝimo, kiu devis okazi virtuale pro la pandemio. Ŝi kaj la LKK elektis kiel kongresan temon “La mondon ligas animoj de Hiroŝimo”.

Profesie ŝi laboris kiel instruistino en elementa lernejo. Nuntempe ŝi estas ĉiĉeronino en la hiroŝima Paca Parko, kie ŝi gvidas la turistojn kaj vizitantojn kaj klarigas pri la eventoj de la sesa de aŭgusto 1945, kiam la unua atombombo falis sur la urbo Hiroŝimo. Ŝi ludas gravan rolon en la pacmovado en Hiroŝimo per kolekto de subskriboj por subteni malarmadon de nukleaj armiloj.

## **Internacia Esperanto-koruso kunlaboris kun la LigKomitato de NROj ĉe Unesko okaze de festivalo por paco**

Neregistaraj organizoj partneraj kun Unesko jam plurfoje organizis eventojn okaze de la Internacia Tago de Paco (21 septembro). En 2019, Michel Thouzeau, pacmovada iniciatinto de la afero, proponis, ke Esperanto estu unu el la kvar laborlingvoj (krom angla, franca kaj hispana) de aranĝo planita por 2020, en kiu korusoj el la tuta mondo kantu por la paco kaj tutan filmon oni muntu per ĉiuj kolektitaj filmetoj. Estas rimarkita la grava kontribuo de Esperantistoj en tiu filmo, spektebla ĉe <https://youtu.be/ZF4o-ZmOdgQ>.

Al tio aldoniĝis aranĝo en Toloso (Eŭskio – Hispanio), urbo de la invitanta organizo TOPIC, kiu reprezentas UNIMA (internacia organizo pri pupteatro) ĉe Unesko. Tiu surloka evento, planita unue por 2020, estis prokrastita al 2022 (17 septembro) pro la pandemio. Ses profesiaj korusoj el ĉiuj kontinentoj estis invitatitaj, kaj Zdravka Boytcheva sugestis kroman Internacian Koruson kun kantistoj el multaj landoj, kiuj kantu en Esperanto. La Internacia Koruso, kiu partoprenis dank' al financa subteno de, interalie, Universala Esperanto-Asocio kaj de Pangeo: Inĝenierado pri Paco, konsistis el dudeko da kantistoj el dekduo da landoj eŭropaj kaj amerikaj, kaj estis unu el la kvar korusoj partoprenintaj: la aliaj venis el Kolombio, Madrido kaj Eŭskio (Hispanio). Reprezentis la koruson (kaj sekve UEA) en la matena podia diskuto pri “paco, arto kaj junularo” Linda Le Nepveu. La korusoj kantis dumtage sur tri gravaj placoj de la urbo, kaj vespere en teatro. Ili krome kunkantis “Zatoz”, speciale komponita de fama eŭska

komponisto Josu Elberdin. En la retejo de la evento <https://www.bakea.eus> eblas spekti la podian diskuton, la vesperan koncerton kaj kromajn fotojn de la evento. Plia filmo farita de esperantistoj estas muntata kun ankaŭ la ekstera kantado.

Tiu ĉi evento plifirmigis la ligan de UEA kun la LigKomitato de NROj ĉe Unesko. Ties prezidanto, Davide Grosso, de la Internacia Konsilio pri Muziko, akceptis membri en la Honora Komitato de la venontjara Universala Kongreso de Esperanto, en Torino, Italio. Krome, UEA estas invitita kontribui al la 13a Unesko-Forumo (<https://ngo-unesco.net/mobilising-ngos-2022>) okazonta la 21an kaj 22an de novembro en Otavo (Kanado), pri indiĝenaj lingvoj (prelegos iama UEA-prezidanto kaj fakulo pri indiĝena edukado prof. Mark Fettes).

---

**Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).**